

Annette von Droste-Hülshoff, Lastaj vortoj	Annette von Droste-Hülshoff, Lastaj vortoj (1)	Annette von Droste-Hülshoff, Letzte Worte	Annette von Droste-Hülshoff, Lastaj vortoj (2)
<i>tradukita de Joseph Ferdinand Berger</i>	<i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>		<i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>
	<i>1a traduk-versio</i>		<i>2a versio</i>
Amatoj, kiam min forlasis spirit', ne ploru do pro mi! Por paca ekzistad' min kaŝis en brila tag' la bona Di'.	Karuloj, kiam pasis mia Spirit', pri mi ne ploru vi; Ĉar lumas jen en paco Dia Eterna tago ja al mi.	Geliebte, wenn mein Geist geschieden, So weint mir keine Träne nach; Denn wo ich weile, dort ist Frieden, Dort leuchtet mir ein ew'ger Tag.	Karuloj, kiam pasis mia Spirit', pri mi ne ploru vi; Ĉar lumas jen en paco Dia Eterna tago ja al mi.
Ne estas plu ĉagrenota. Eternas via bild' ĉe mi. Mi petos pri balzamo vera por vundoj kaj dolor' de vi.	En tiu senafikta foro Memoru daŭre mi pri vi, Por viaj vundoj kaj doloro Mildigon volas peti mi.	Wo aller Erdengram verschwunden, Soll euer Bild mir nicht vergehn, Und Linderung für eure Wunden, Für euern Schmerz will ich erlehn.	En tiu senafikta foro Memoru daŭre mi pri vi, Por viaj vundoj kaj doloro Mildigon volas peti mi.
Se ŝvingas Pac' en nokta ombro Seraffugilojn super Ter', ne pensu plu pri mia tombo! Salutas mi el stela sfer'.	Se nokte per flugilo sia Pac' tuŝas tiun mondon ĉi, Ne pensu plu pri tombo mia, Vin de l' stelar' salutas mi. <sup>2</sup>	Weht nächtlich seine Seraphsflügel Der Friede übers Weltenreich, So denkt nicht mehr an meinen Hügel, Denn von den Sternen grüß' ich euch!	Se venas kun flugilo sia La nokta paco al la Ter', Ne pensu plu pri tombo mia, Salutas mi el stela sfer'.
...	...	...	...

---

<sup>2</sup>aŭ: Ĉar de l' stelar' salutas mi.

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de JOSEPH FERDINAND BERGER (\*1894-10-07 - †1976-03-28) en 1958.

Arg-160-467 (2009-11-22 09:37:58)

Tiu ĉi traduko de la poemo estas unue publikigita en 1958, ĝi aperis en la Esperanto-revuo "Norda Prismo", n-ro 58/2, sur paĝo 74. Vidu ankaŭ la ttt-ejon "http://donh.best.vwh.net/Re-vuoj/np/np5802/lastaj.html" de s-ro Donald Harlow el Pinole CA-94564, Kalifornio. Malgraŭ la supra indiko la poemo ne estas verkita de la poetino mem, sed - laŭ pli nova scienca ekkono - de ŝia nevino Elisabeth, post la morto de Annette von Droste-Hülshoff. Oni ĝis nun nur atribuis la poemon al Annette von Droste-Hülshoff. Pri Joseph Ferdinand Berger rigardu ankaŭ la retejon [http://wopedia.mobi/eo/Joseph\\_Ferdinand\\_Berger#2](http://wopedia.mobi/eo/Joseph_Ferdinand_Berger#2).

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-05.15.

Arg-160-316 (2004-05-16 13:55:41)

La origina versio de tiu ĉi poemo estas laŭ informo de 06.02.2003 fare de d-rino Edda Baußmann de la societo "Annette von Droste-Hülshoff" (Am Haus Rüschaus 81, D-48161 Münster/Westfalen, Germanio, [bausmann@drostegesellschaft.de](mailto:bausmann@drostegesellschaft.de), [www.drostegesellschaft.de](http://www.drostegesellschaft.de)) ne verkita de la poetino mem sed de ŝia nevino Elisabeth, post ŝia morto.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 - †1848-05-24).

Arg-160-315 (2004-05-27 10:56:26)

Dies Gedicht ist jedoch nach neueren wissenschaftlichen Erkenntnissen nicht von der Dichterin selbst verfasst worden, sondern, nachdem Annette verstorben war, von deren Nichte Elisabeth von Droste-Hülshoff (1845 - 1912). Man hat es aber bisher der Annette von Droste-Hülshoff zugeschrieben. Dies ist mir, Manfred Retzlaff, am 6. Februar 2003 von Frau Dr. Edda Baußmann, wissenschaftliche Mitarbeiterin der Droste-Gesellschaft (Am Rüschaus 81, D-48161 Münster, [bausmann@drostegesellschaft.de](mailto:bausmann@drostegesellschaft.de) - [www.drostegesellschaft.de](http://www.drostegesellschaft.de)) fernschriftlich mitgeteilt worden.

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2004-05-16.

MR-311-5 / Arg-160-474 (2004-05-16 13:52:23)

La trian strofon mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis iom laŭ la modelo de Josspoh Ferdinand Berger, uzante ankaŭ la rimvortparon "Ter' - sfer". En mia unua traduko-provo de l' 26.08.1997 resp. de l' 15.05.2004 mi iom tro ofte uzis la rimvortojn "mi, vi, ĉi". Tio certe ne estas tre bona solvo kaj efikas iom ĝena.